

# La kursoj de Santiago Mulas

La Esperanta instruado far de Santiago Mulas Gallego estis persona dediĉo kiu etendiĝis laŭlonge de tuta duonjarcento, ekde la jaro 1959 ĝis la nuntempo, ekde la epoko de Alberto Menéndez kaj Alfredo Villa ĝis la nuna kunlaborado kun pli junaj samideanoj, en la **Ateneo Jovellanos** kaj en ĉiu alia loko kie eblus tion fari kaj estis personoj kiuj interesiĝis pri nia afero, unue kadre de la **Esperantista Grupo Jovellanos** kaj poste kadre de la renomita **Astura Esperanta Asocio**, ĝenerale en Gijón sed ankaŭ, foje, en aliaj lokoj, kiel Avilés…






Tiutipa dediĉo al la Internacia Lingvo ne estas, por la personoj kiuj plenumas ĝin, peniga per si mem, male, la Esperanta instruado povas doni al la instruantoj grandan plezuron kaj memkontenton, tamen, estas kelkaj cirkonstancoj, kiuj alportas al tiuj instruistoj egan frustriĝon kaj fiaskosenton. Ĉiuj, kiuj iam dediĉiĝis al tiu tasko, scias ke la gelernantaro iom-post-iom malpliiĝas laŭlonge de ĉiu kurso. Ĉefe, post ĉiu ferieto de Kristnasko-tempo aŭ de Pasko-tempo la aro da lernantoj restas duonigita aŭ trionigita. Nur eta nombro da lernantoj, kiuj komencis la kurson, persistas ĝis la kurso-fino. Iuj el ili malaperas tiam kaj la instruisto neniam scios ĉu ili plu praktikados la akiritan konon pri la Internacia Lingvo. Aliaj lernantoj ripetas plurfoje la Bazan Kurson kaj iuj eĉ lernas poste la Perfektigan Kurson. Kutime, inter ĉi-lastaj ne mankas tiuj, kiuj aliĝas al la loka Esperanta Grupo kaj eble ankaŭ al iu E-revuo dum iom da tempo, kvankam ne ĉiuj ili restas kiel aktivuloj de la E-movado. Sed eĉ inter la malmultaj kiuj aktivadas dum kelkaj jaroj en tiu movado estas iuj kiuj forlasas ĉion ekde difinita momento por ne plu reveni al la porEsperanta laborado. Tial, ĉiu Esperanto-instruisto, same ol Santiago Mulas mem, ofte povas dubi ĉu efektive iome utilis sian sindediĉon al la Esperanta instruado.

Kiel dirite, Santiago travivis tiun sperton dum multe da tempo. Sed el tiom longa, 50-jara periodo, ni deziras speciale emfazi la sepjaran periodon inter la jaroj 1969 kaj 1976. Kial? Ĉar dum tiuj jaroj la agado de la Esperantista Grupo Jovellanos tre malpliiĝis; ĝi preskaŭ tute falis, kaj la kursoj de Santiago Mulas, kiuj plu daŭris tiam, oni povas diri ke ili estis preskaŭ la sola vivosigno de la urba esperantismo kaj la kerno ĉirkaŭ kiu oni povis poste reartikigi la grupon. Ja, post la forpaso de Alfredo Villa kaj la ĉeso de la gvida aktivado far de Alberto Menéndez, multaj iamaj membroj de la grupo kaj ankaŭ kelkaj estraranoj forlasis la porEsperantan aktivadon rezultante kvazaŭ psaralizo de la E-grupo. En tiu kunteksto, la persisto de samideano Mulas savis la kontinuecon de la esperantisma tradicio en Gijón kaj evitis la kolapson de la movado en la urbo, kio estus povinta signifi ĝian definitivan malaperon kiel okazis en aliaj lokoj. El la kursoj gviditaj de S. Mulas dum tiuj jaroj restis novaj aktivuloj de la grupo, kiaj Marina Piquero, Luis Muñiz, Julio Argüelles, Ildefonso Domínguez… kies nomoj aperos poste en nia historio en rilato kun E-aktivado kaj taskoj de la E-grupo.